

Gardu Ainajn Loknomojn

Kirikae Hideo

8-a de novembro, 2006

En la mapo de la urbo Ĉitose vi trovos la nomon de kvartalo “Kacuragi-ĉoo” sur la bordo de la rivero Ĉitose-gaŭa, kiu fluas tra la urbo. La fama kaj belega lago Ŝikocu-ko estas la fonto de la rivero.

En la unua periodo de la koloniado de Japanoj ankoraŭ restis ainaj vilaĝoj apud la rivero. Eĉ en la nuna tempo relative multaj Ainoj loĝas tie.

Antaŭ pli ol dek jaroj mi ekkonis malnovan nomon de Kacuragi-ĉoo. Ĝi estis “Rankoŝi,” originale, “Rankoŝi” en la aina. Maljunaj Ainoj informis al mi pri tio. La signifo de la nomo “Rankoŝi” estas ‘loko, kie ranko, japane, kacura kreskas.’ Ni rimarkas, ke la japana “Kacuragi-ĉoo” estas traduko de la aina “Rankoŝi.”

La loknomo “Rankoŝi” aperas ankoraŭ en eseoj de aina folkloro verkitaj de japanaj ainologoj post la mondomilito. Tial la ŝanĝo aŭ anstataŭiĝo de la nomo certe ne okazis en fora pasinteco. Tamen mi ne konas, kiam la aina nomo malaperis sur la mapo.

Mi bedaŭras kaj malĝojas pro la foriĝo de la bela nomo Rankoŝi. Kial la loĝantoj preferis la japanan nomon? Kial ili forigis la tradician nomon? Ĉu ili deziris forviŝi ainan koloron for de la adresoj de siaj loĝejoj?

Kiel nomon de la tuta teritorio de la kolonio en Ĉitose japanaj kolonianoj heredis la ainan loknomon “Ŝiikot” unue. La signifo estas ‘granda kavo.’ Tamen ili baldaŭ forĵetis ĝin, kaj inventis tiel gratulan japanan nomon kiel “Ĉitose,” nome, ‘mil jaraĝoj’ por alvoki eternan feliĉon al la kolonio. Tio estas ekzemplo, en kiu tute senrilata japana nomo forpelis kaj anstataŭis ainan loknomon. Feliĉe, la loknomo “Ŝiikot” postvivas kiel la nomo de la lago Ŝikocu-ko.

Sur la bordo de la rivero Tokaci-gaŭa vi trovos vilaĝon, kies nomo estas “Juutari”. Por la unua silabo de “Juutari” oni skribas ideograme “juu” ‘kuraĝa,’ kaj por la dua kaj tria silaboj “tari” ‘piedo.’ Do “Juutari” signifas ‘kuraĝan piedon’ laŭ la ideogramoj.

Supozeble, la vilaĝo nomiĝis “Isamutari” en la frua periodo de la Koloniado. “isamu” ‘esti kuraĝa’ estas alia legado de la ideogramo “juu”. “Isamutari” estas ekzemplo de sontraduko, traduko de sonoj, nome, neperfekta imitaĝo de la originala sono. La originala sono de “Isamutari” estas “Esampitar.” La signifo de “Esampitar” estas ‘lango-forma ŝtonoza benko etendita alvalen en la rivero.’ La nuna nomo ‘Juutari’ kvankam estas deaina etimologie, tamen konservas nek la originalan signifon nek la originalan sonon.

Antaŭ dek ses jaroj mi loĝis en la urbo Tottori. Kvartalo sur la marbordo de la urbo nomiĝis “Karo.” Sed oni skribis ideograme “Garō”; “ga” ‘gratuli’, “ro” ‘roso.’ Tamen neniu el la urbanoj nomis la kvartalon “Garō.” Ili ĉiam diris “Karo” senvoĉe en la unua konsonanto. La senvoĉa legado estas tiel nomata

kan-sono, japane, kan-on de la ideogramo ‘gratuli’, kies uzado estas tre rara kaj aŭdiĝas eĉ kurioza. La sono “Karo” estas certe hereditaj de buŝoj al oreloj dum kelkcent jaroj kontraŭ la normala legado de la ideogramo. Kiel vi rigardas la urbanojn de Tottori, kiuj konservadis kaj konservadas la tradician legadon de la loknomo?

Cetere, en la montaro Ĉuugokusanĉi vi trovos kelke da nomoj de montoj, kiuj enhavas “sen” anstataŭ “san” ĉe la fino de la nomoj. Ekzemple, Dai-sen, Hiru-zen, Oogi-no-sen, Hjoo-no-sen, ktp. “sen” estas go-sono, japane, go-on de la ideogramo ‘monto.’ “san” estas kan-sono, japane, kan-on de la sama ideogramo. Go-sonoj estas sonoj de ideogramoj enkondukitaj el Ĉinio pli frue ol kan-sonoj. La legado de la go-sono “sen” aŭdiĝas al ni tre speciala kaj nekutima. Ni normale legas la ideogramon per la kan-sono “san” tiel, kiel ni nomas, ekzemple, Monton Huji “Huji-san”. Kiel vi pensas pri la loĝantoj en la montaro Ĉuugokusanĉi, kiuj observadas tradicion persiste?

La problemo de ainaj loknomoj estas la problemo de la vivoj de loĝantoj en Hokkaido. Mi kredas ke loknomoj estas atestiloj de historio. Malaperigi ainajn loknomojn signifas nei la historion de Hokkaido. Homo ne povas vivi sen sia propra historio. Homo kiu ne portas sian historion, homo kiu forgesas sian historion, homo kiu neas sian historion estas mizera estaĵo. Lia vivo estas tro malriĉa. Se loĝantoj de Hokkaido rimarkus valoron de la ainaj loknomoj, kaj se ili rimarkus, ke la ainaj loknomoj valoras por neniu krom ili mem, ilia vivo ekhavis ian profundecon kaj ian nuancon. Tio estas la vera kulturo. Por la kulturo, por akumuli tradicion tie dike, ni devas gardi ainajn loknomojn.